

Bedaŭrinde, ni ĉiuj iam renkontas la malon de bonkoreco. Do nia sperto kun krueleco, malintereso, neatentemo, aroganteco kaj eĉ perforto bone sciigas, kio bonkoreco ne estas.

Gravas por mi aŭskulti la vortojn. Kiam iu diras bonkorecon, mi ne nur diras, ke mi komprenas, ĉar mi konas la vorton, sed mi demandas, kion ĝi signifas. Ĉiam mi ekscias ion malsaman, ĉiam interesan.

Bonkoreco estas esprimo por iu formo de amo. Tiu, kiu ne trudas kondiĉojn, ne taksas, sed akceptas homojn en ilia diverseco, ne provas ŝanĝi ilin laŭ sia bildo aŭ posedi ilin. Esti afabla kaj respektema al tiuj, kiuj havas signife malsamajn sintenojn kaj opiniojn, ofte estas defio.

Iuj homoj estas afablaj denature, aliaj devas lerni tion. Komence, ni ridetos pli, uzos la vortojn "bonvolu kaj dankon", preparos por nia partnero kafon aŭ teon, ni dankos por vespermanĝo, por lavitaj kaj gladitaj vestaĵoj aŭ por riparita ŝranko. Ni vokas la gepatrojn kaj demandas ilin, kiel ili fartas kaj ĉu ili bezonas ion. Ni rimarkas ankaŭ aliajn homojn, iliajn esprimojn. Ni pardonpetas, se ni fuŝis ion, ni ne saltas en la interparolon.

Sed oni ne forgesu ankaŭ la afablecon. Traktante al vi kun afableco same kiel al via plej bona amiko, ne komparante vin kun aliaj kaj ne juĝante iun ajn, inkluzive de vi mem. Ĝi estas la plej bona ekzemplo por niaj infanoj, ĉar tio, kion ni faras, estas multe pli grava ol tio, kion ni rakontas al niaj posteuloj.

Estas elektita kaj libere adaptita el la ĉeĥa revuo Květy (Floroj) de E. Pazourková, tradukis L. Srbová.

□□

Historio de la unua sukerkubo en la mondo

Seppaĝan interesan artikolon kompilis helpe de retaj informoj kaj esperantigis Josef Kříž, Ĉeĥa Respubliko, por suplemento „Antaŭen“ de organa „Informilo“ de la Asocio de Handikapitaj Esperantistoj. Post kiam mi tralegis ĝin, mi notis tion ĉi: La granita monumento estis konstruita en 1983 kiel memorigilo al la 140a datreveno de la komenco de sukerkubo-produktado en Dačice. En 2012, en ĝia ĉirkaŭaĵo estis instalitaj memortabuloj memorigantaj la jaron 1843 en dek du lingvaj versioj, de kiam la inventaĵo el Dačice – la kuba suker-formo – komencis sian triumfan vojaĝon tra Eŭropo kaj mondaj merkatoj. La monumento staras en la parko proksime de alta renesanca turo de la St. Laŭrenco – preĝejo.

Kiam mi finlegis tiun ĉi lastan alineon, mi senpense malfermis la tirkeston en la kuirejo kaj elprenis ileton senutile tie jam longe kuŝantan, kiun mia patrino surtabligadis, kiam ŝi gastigis gastojn per kafo – prenileton por preni sukerkubeton el sukerujo al



taso. Penseme mi montris ĝin al mia nepino kaj demandis, ĉu ŝi scias, kio ĝi estas. Ŝi rigardis ĝin kun surprizo.

Ŝia generacio dolĉigas kafon kaj teon per sukero el paper saketoj en formo de sablo, pri sukerkuboj ŝi ne scias.

Mi rememoris dolĉan senton, kiam sukerkubeto suĉis teon,.. Aŭ kiam mi estis infano iom malvarmumita kaj patrino surgutis por mi sukerkubon per „Alpa“ kuracherba likvaĵo.

Transprenite el la libro LEGAĴOJ XII. de J. Drahotová

Blindulo kaj lakto KABE

Homo blinda de la naskiĝo demandis homon vidkapablan: "Kian

koloron havas la lakto?" La vidanto respondis: „La koloro estas sama, kiel la blanka papero."

La blindulo demandis: „Ĉu ĉi tiu koloro same krakas en la manoj, kiel la papero?" La vidanto diris: „Ne, ĝi estas blanka, kiel la blanka faruno."

La blindulo demandis: „Ĉu ĝi estas same mola kaj facile ŝutebla, kiel la faruno?" La vidanto respondis: „Ne, ĝi estas simple blanka, kiel la blanka kuniklo."

La blindulo demandis: „Ĉu ĝi estas same haroriĉa kaj mola, kiel la kuniklo?" La vidanto respondis: „Ne, la blanka koloro estas same blanka, kiel la neĝo."


La blindulo demandis: „Ĉu ĝi estas malvarma, kiel la neĝo?" La vidanto donis novajn kaj novajn ekzemplojn, sed la blindulo ne povis kompreni, kia estas la koloro de la lakto.

El la Legaĵoj XII. de J. Drahotová

Japanio nombris siajn insulojn

Ĝis nun oni pensis, ke Japanio estas disvastigita sur malpli ol sep mil insuloj. En la nova mapado, tamen, geografiistoj nombris 14 125 insulojn, t.e. pli ol duoble pli multe. Kiel tia ŝanĝo estas ebla? Laŭ la agentejo Kjodo, pli da insuloj estis malkovritaj per novaj, pli precizaj mezurmetodoj. La japanoj konsideras ajnan terpecon pli grandan ol cent metrojn en cirkonferenco kiel insulon. Krome, ĉar Japanio kuŝas en seisme aktiva areo, la nombro da insuloj povas varii signife tra la jaroj. Por la nuna censo, sciencistoj uzis ciferecigitajn mapojn kaj

komparis ilin kun aerofotoj. La antaŭa censo okazis en 1987.



El la ĉeĥa gazeto Květy (Floroj) tradukis L.S.